


België - Belgique
P.B. 3940 Hechtel
BC 30754

LA PONTO

Tweemaandelijks tijdschrift van de Limburgse Esperantovereniging.



Jaargang 1, nummer 4 , november-december 2008
Verschijnt op de eerste dag van iedere onpare maand.
Erkenningsnummer: P808228
V.U.: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, 3940 Hechtel-Eksel
Tel. 011-73.20.47 – E-mail: pieter.doumen@skynet.be

LA PONTO

Dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)
Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.
Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato
Jarkolekto 1, N-ro 4 : novembro-decembro 2008
Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47
Retadreso: pieter.doumen@skynet.be

Redaktore...

Karaj Gelegantoj,

Nia revuo ricevas neatendatan sukceson, kio kompreneble faras plezuron al ni. Ni denove ricevis plurajn gratulojn pro ĝi. Koran dankon al ĉiuj gratulintoj! Tio jam estas sufiĉe rekompenco por niaj klopodoj.

Kelkaj gvidantoj de kluboj demandas nin, ĉu ankaŭ aliaj esperantistoj, ekzemple tiuj kiuj ankoraŭ lernas la lingvon kaj bezonas ne tro malfacilan legadon, povus ricevi ĝin. La respondo estas jes: ĉiuj esperantistoj rajtas ricevi ĝin. Sufiĉas sendi al ni la retadresojn. Sed ricevantoj de retekzemplero ankaŭ povas printi ĝin por samklubanoj. La revuo estas senpaga por ĉiuj. Ni faras tion pro simpatio al ĉiuj ŝatantoj de nia lingvo. Kiam ni ne plu povos sendi la revuon senpage, ni avertos vin.

La numeron 3 ricevis entute 53 esperantistoj en Belgio kaj (kelkaj) en Nederlando.

Memkompreneble 'La Ponto' ĉiam restos la revuo de LEA kaj do ĉiam estos redaktata el tiu vidpunkto! Tamen se vi scias verki interesan artikolon en Esperanto pri iu ajn temo, ĝi estos bonvena kaj estos publikigita. Ne faru al vi zorgojn pri eblaj eraro! Ni rezervas al ni la rajton korekti ilin.

Kelkaj esperantistoj ankaŭ demandas sin, kiun ponton mi metis sur la titolpaĝon. Fakte estas du pontoj. La pli malproksima estas la konata 'Pont Neuf' trans Sejno en Parizo.

Mi denove deziras al vi agrablan legadon.
Jan Doumen

UEA centjara (fino)

(Honderd jaar UEA - einde)

En 1989-1990 malaperis la komunismaj reĝimoj en Eŭropo. La sekvo estis ke la esperantistoj estis ja liberaj vojaĝi, sed pro la pli malfacilaj financaj kondiĉoj la asocioj komence ŝrumpis.

La fino de la Dua Mondmilito lasis Eŭropon dividita en du malamikajn blokojn. Stalin, kiu

malfidis la 'kapitalisman Okcidenton, devigis la landajn asociojn de Bulgario, Hungario kaj Ĉeĥoslovakio ekŝiĝi el UEA. Kvankam ili denove rajtis aliĝi al UEA en 1955 sub Ĥruŝĉov, la malvarma milito forte limigis la moveblecon de la esperantistoj malantaŭ la Fera Kurteno dum 40 jaroj. Danke al la singarda politiko de UEA pluraj UK-oj povis esti aranĝitaj en la Orienta Bloko : en Varsovio (1959 kaj 1987), Sofio (1963), Varna (1978) kaj Budapeŝto (1966 kaj 1983). Plej komplikaj estis la rilatoj kun Sovetio, kies esperantistoj ricevis nur escepte la permeson iri al UK en najbara komunista lando.

La postmilitan tempon karakterizis ankaŭ la fino de koloniismo. Ekde la kvindekaj jaroj UEA pli forte emfazis la agadon ekster Eŭropo kaj Nord-Ameriko. Tiel la jugoslavo Tibor Sekelj multe laboris por disvastigi Esperanton en la Tria Mondo, precipe en Latinameriko. Madeleine Haudebine instruis nian lingvon en Hindio, Simo Milojević en Nepalo kaj Victor Sadler en Srilanko. Ekde 1980 Hans Bakker faris multe por starti la 'Afrikan Agadon'. UEA finance subtenis afrikanojn por partopreni en UK-oj. En 1965 la 50-a UK okazis en Tokio. Brazilo sekvis en 1981, Pekino en 1986, Havano en 1990. La japano Hideo Yagi estis prezidanto de UEA de 1962 ĝis 1964, la koreo Lee Chong Yeong de 1995 ĝis 1998. Precipe la japanoj finance subtenas la azian movadon. En la UK de Jokohamo partoprenis ĉ. 200 azianoj el 14 landoj.

Novajn problemojn kaŭzas la nuna tutmondiĝo kaj la enorme kreskintaj internaciaj kontakteblecoj per komputilo, kiuj okazas precipe en la angla. La idealo de Zamenhof proksimigi unuj al la aliaj la homojn de ĉiuj landoj per Esperanto ŝajnas tiel perdi de sia valoro. Sed la komputilo ankaŭ donas novajn eblecojn lerni la lingvon, precipe al junuloj, kiuj ĝenerale ne sentas la bezonon de mond-vasta organizaĵo. Tiu tendenco al individualismo kaŭzas problemojn al UEA, kies membraro falis de 36.351 en 1987 al 14.495 en 1994. En 2006 UEA havis malpli ol 16.000 membrojn, el kiuj ĉ. 6000 individuajn.

Aliflanke la delegitara reto de Esperanto kaj Pasporta Servo estas unikaĵoj en la mondo, kiuj donas multajn eblecojn, precipe sur la kampo de turismo kaj tradukado. Estas do grave pliigi la internaciajn servojn pere de Esperanto.

J. D.

(Fontoj : 'La centjara vojo de Uea' de Ulrich Lins; 'Elektitaj paroladoj kaj prelegoj' de Ivo Lapenna.)

Remembris en FEL kaj LEA !

(Word weer lid van FEL en LEA !)

Karaj Membroj de FEL kaj LEA, La jaro proksimiĝas al sia fino, kaj jam estas tempo pensi pri la renovigo de via membreco. Tial ni petas vin ne forgesi pagi vian kotizon por la nova jaro!

Kiel vi scias, organizaĵoj ne povas vivi de la vento kaj do bezonas subtenon. Tiel vi kontribuas al la vivteno kaj disvastigo de Esperanto en Flandrio kaj Limburgo, kaj vi samtempe ricevas 'Horizon-taal', la revuon de FEL, kaj 'La Ponto' de LEA kun interesaj informoj pri la vivo en Esperantio kaj la strebadoj de ĝiaj anoj.

Ne indiferentiĝu aŭ malkuraĝiĝu ! La afero bezonas vin, kaj la estonteco estas al tiuj kiuj scias persisti ! Ĉio dependas de vi !

La kotizo por FEL sumas je 25 eŭroj. Se vi deziras remembris nur en LEA, la kotizo estas 12,50 eŭroj. Membroj de FLEJA pagas nenion. Parolu ankaŭ al geamikoj-geesperantistoj pri la graveco de ilia subteno kaj partopreno. La bankkonto de LEA estas : 735-0190144-12.

Koran antaŭan dankon nome de FEL kaj LEA ! Se vi havas problemon koncerne al FEL, jen ĝia telefonnumero: 03-234 34 00.

Tago de la Lingvoj

(Dag der Talen)

La 26-a de septembro jam de dek jaroj estas dediĉita al la lingvoj. En tiu tago (aŭ ĉirkaŭ ĝi) okazas centoj da eventoj dise en Eŭropo (kaj la mondo) por celebri la lingvan riĉecon de nia planedo kaj por atentigi la homojn pri la graveco de lingvolernado.

La eventoj estas diversaj : ludplenaj aktivaĵoj, ekspozicioj, modellecionoj, lingvaj enigmoj, konkursoj ktp. Ili okazas en lernejoj, institucioj, kadre de klubaj aŭ sociaj eventoj.

En la repaĝo de la Konsilio de Eŭropo estas listigitaj naŭ Esperanto-eventoj, okazigitaj honore al tiu tago.

Ankaŭ en la retejo 'edukado.net'! Bonvolu almenaŭ legi iom pri aliaj lingvoj aŭ pri via propra lingvo. Vizitu la sekcion: 'Instruu vian lingvon', kie legeblas interesaj informoj pri diversaj lingvoj en

<http://www.edukado.net/pagina/Instruu+vian+lingvon/>

(Laŭ novaĵletero de edukado.net)

Novaj el Esperantolando

(Nieuws uit Esperantoland)

Aŭstrio – 'Paradiza Trapasejo' de la aŭstra aŭtoro kaj komponisto Gerhard Rühm estas aŭdebla en Vieno en la publikaj kortoj 7 kaj 8 de la Muzea Kvartalo ĉiutage ekde la 10-a ĝis la 20-a horo ĝis la 31-a de decembro 2008.

La radia versio, elsendita de la Aŭstra Radio la 14-an de septembro, estas aŭskultebla ĉe http://www.kunstradio.at/2008B/14_09_08.htm l. Klaku al «MP 3 Play».

La artisto serĉis belsonan lingvon por la teksto. Pro tio li elektis Esperanton. La tekston legas 5 virinoj el koruso (neesperantistinoj). Bonan aŭskulton! (Leopold Patek)

Belgio – Sabaton la 20-an kaj dimanĉon la 21-an de septembro, de la 10-a ĝis la 18-a, kunlabore kun Ipernity kaj kun la subteno de la urbo Antverpeno, la Flandra Esperanto-Ligo aranĝis internacian fotoekspozicion sub la titolo «Esperanto meets Ipernity». La ekspozicio okazis en la Volkshogeschool Elckerlick en Antverpeno. Partoprenis tri profesiaj fotografistoj kun enkadrigitaj fotoj: Daniel Philippe (*Aerfotoj de Eŭropo*), François Glorieux (*Maskoj el Venecio*) kaj Olivier Pollet (*Varmejoj de Laeken*).

Ekspoziciis ankaŭ multaj amatoraj fotografistoj (projekciado de fotoj kaj kelkaj fotoj en kadro), inter kiuj pluraj Esperanto-parolantoj, el 12 landoj: Aŭstralio, Belgio, Bulgario, Germanio, Francio, Hungario, Israelo, Nederlando, Pollando, Rusio, Hispanio kaj Svedio.

Multaj interesatoj, precipe neesperantistoj, vizitis la ekspozicion.

(El 'Listo de la membroj de FEL')

Ĉeĥio – Nova Esperanto-Muzeo en Svitavy. – Rezulte de la kunlaboro inter la Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj la gvidaj instancoj de la urbo Svitavy la 20.09.2008 en la urbo ekfunkciis nova, publike vizitebla Esperanto-Muzeo. La inaŭguro de la muzeo, en kiu povis partopreni ĉiuj Esperantistoj, okazis je la 14-a horo.

Mi komprenas, ke pro la geografia distanco ne estis ebla via persona partopreno, sed mi petas vin iel reagi al tiu evento en la retadreso esperanto@muzeum.svitavy.cz kaj sendi kopion al muzeum@esperanto.cz (kiun ni tradukos ĉeĥen), por ke la urbaj instancoj vidu, ke la Esperanto-Muzeo vere helpas efektive propagandi la urbon en la mondo, kaj do ke la muzeo restu vere DAŬRA, kiel promesite

flanke de nunaj urbaj gvidorganoj. Ne gravas, ĉu vi sendas gratulon, bondeziron aŭ promeson viziti la Muzeon dum eventuala vojaĝo al Ĉeĥio.
(Petro Chrdle)

Pollando 1 – Freŝdiplimitoj en Poznano. – En septembro okazis nova sesio de la Interlingvistikaj Studoj en Poznano. Dum la studsemajno nova grupo komencis siajn studojn, kaj pluraj sukcesintoj el la malnova grupo finis ilin.

Inter la studentoj kiuj frekventis la poznanan katedron dum tri jaroj, 4 esperantistoj sukcese verkis kaj defendis sian diplomlaboraĵon :

1. Kirilo Brosch el Germanio kun *'Pri la klasifikado de la esperantaj morfemoj'*.
2. Marc Bavant el Francio kun *'La viva genro preter akordo'*.
3. Horst Vogt el Germanio kun *'Komunikadproblemoj en EU'*.
4. Anne Jausions el Francio kun *'La plej oftaj malfacilaĵoj de franclingvaj Esperanto-parolantoj'*.

En la lastaj jaroj la universitata studprogramo de UAM (Universitato Adamo Mickiewicz), rezulte de kunlaborkontrakto inter ILEI kaj UAM, ebligis specialiĝi ankaŭ pri metodologio. Tri partoprenintoj de la unujara trejnsemajno finis la studojn kaj defendis sian laboraĵon :

1. Slezákné Tar Edit el Hungario kun *'Instruado de akuzativo je diversaj niveloj'*.
2. Witold Czerwinski el Pollando kun *'Pedagogia vortareto Esperanto-pola'*.
3. Jurate Bartskiene el Ukrainio kun *'Utiligo de poemetoj, rimajoj kaj kantoj en lingvoinstruado'*.

Ni planas publikigi kiel eble plej multe da diplomlaboraĵoj. Rezulte de tio vi jam povas legi surekrane du el la supre listigitaj verkoj en la koncerna sekcio de la Legejo ĉe <http://edukado.net>.

(Fonto: Ret-info: <http://www.eventoj.hu>)

Pollando 2 – Radioamatora «73» el Bjalistoko. – «73» en la radioamatora slango signifas «Bonkorajn salutojn». Oni sendas ilin el Bjalistoko per Morso-kodo aŭ per vortoj en ĉiuj lingvoj. Ĉio ĉi por radioamatoroj posedantoj de amatoraj mallong-ondaj radiosendiloj.

Ĝis la 94-a UK en 2009 en Bjalistoko restas ankoraŭ iom da tempo, sed la bjalistokaj esperantistoj, kune kun la radioamatoroj preparis specialan diplomon: «Bjalistoko – Urbo de la Universala Kongreso de Esperanto 2009 ».

La diplomon povas ricevi radioamatoroj el la tuta mondo kiuj inter la 30.03.2008 kaj la 25.07.2009 havos mallong-ondajn radiokontaktajn kun bjalistokaj radioamatoroj sub diversaj kondiĉoj. Ĉiuj radiokontaktoj estos konfirmitaj per porokazaj konfirmokartoj.

Posedantoj de la diplomo ricevos ankaŭ specialan atestilon, rajtigantan ilin al dekprocenta bonifiko por tranaktadoj ĝis la 31-a de decembro 2009 en la hotelo Best Western Hotel Cristal – www.cristal.com.pl .

Jam en la radioetero pole, angle, germane kaj en Esperanto aŭdiĝas alvoko al ĉiuj amatoraj radiostacioj en la mondo kaj invito interparoli kaj viziti la naskiĝurbon de la iniciatinto de Esperanto – Lazar Markoviĉ Zamenhof.

Respondeculo pri la Diplomo Bjalistoko estas Stanisław Dobrowolski, retpoŝta adreso : fy@o2.pl . La diplomo mem estas videbla ĉe : <http://www.hamradio.biaman.pl/kongres/dyplom/jpg> .

La kondiĉoj por ricevi la Diplomon Bjalistoko kaj aliajn informojn pri la kampanjo 'Bjalistoko – Urbo de la Universala Kongreso de Esperanto 2009' estas troveblaj ĉe : http://www.hamradio.biaman.pl/kongres/esperanto_esp.htm .. (Szilvási L., Hungario)

Svisio – La agado favore al Esperanto ĉe UN en Ĝenevo (vidu la sekvantan artikolon) bezonas pli kaj pli la kunlaboron de pluraj atingeblaj kompetentaj tradukistoj, eventuale por urĝaj laboroj. Pro tio mi petas, ke la agantoj en la diversaj landoj plusendu tiun ĉi alvokon.

Tradukontoj sendu sian mesaĝon pri kunlaboremo al traduko@linguistic-rights.org de Stefano Keller, la kunordiganto.

Ni atendas korekto proponojn de la tuta paĝo laŭ la originalo: <http://www.lingvaj-rajtoj.org/traduko> de la landaj agantoj (koncerne la lingvojn, en kiuj jam ekzistas la paĝo, aŭ aldoni ĝin en la propra lingvo).

(Stefano Keller)

Modernigo de Pasporta Servo

(Modernising van 'Pasporta Servo')

Vi eble scias, ke TEJO planas renovigi Pasportan Servon. La unua parto de tiu plano estas la realigo de reta administra datumbazo. Tiamaniere gastigantoj povos pli facile konfirmi sian kunlaboron aŭ alporti ŝanĝojn, kaj mi havos multe malpli da laboro.

Ni konstruos kaj testos tiun novan sistemon ĝis la 1-a de januaro, kaj ni volas uzi ĝin por kompili la eldonon de 2009. Tial ni decidis

prokrasti la kutiman konfirmadon kaj kompiladon. La plano nun estas jena: 01.12.2008: dissendo de la paperaj konfirmopetoj; 1.01.2009: dissendo de la retaj konfirmopetoj.

Dum la venontaj monatoj ni pritraktos la konfirmojn kaj kompilos la libron de 2009 laŭ la nova sistemo. Por la temposkemo vidu:

http://www.tejo.org/vikio/Pasporta_Servo_2.

Ni kalkulas je via kompreno, speciale ĉar multaj 'senpagaj' libroj de la eldono de 2008 ne alvenis ĉe la gastigantoj.

Krome estas planoj krei gastigan retejon por Pasporta Servo. TEJO pripensas, kiumaniere plej bone fari tion, dum ĝi konstruos la retan administran datumbazon. Tiu plano ne neglektos la multajn senretulojn, kun atento pri la sekureco de la informoj, kun bona financa plano ktp. Tuj kiam la reta administra retejo bone funkcios kaj ni havos bonan planon por la gastiga retejo, ni konstruos ĝin ekde januaro 2009.

Ni esperas, ke en junio 2009 ni ne nur havos novan eldonon kaj pli facilan konfirman sistemon, sed ankaŭ modernan gastigan retejon. Kore, Derk Enderveen, retadreso : paspaserv@wxn.nl.

UEA aktivas ĉe UN

(De UEA is actief bij de UNO)

UEA ĉeestis aktive la tritagan Socian Forumon de la Homrajta Konsilio de la Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo (01 – 03.09), kiu pritraktis la malriĉecon en la mondo. Kiel reprezentantoj de UEA partoprenis en ĝi tuttempe Charmian Common kaj Stefano Keller, kaj en la unua tago ankaŭ Cesco Reale. Dufoje reprezentanto de UEA intervenis alparolante la Forumon.

Pro strategiaj kialoj ili decidis anonci sian unuan paroladon jam por la dua tago kadre de la diskuto post la parolado de Anna Biondi el la Internacia Sindikata Konfederacio. Keller prezentis proponon de UEA pri kunlaboro por tradukado kaj disvastigo de la konkluda dokumento de la Forumo en Esperanto kaj kelkaj aliaj lingvoj krom la ses oficialaj. Biondi respondis, ke ŝi jam havas informilojn por «miaj esperantistaj amikoj» por la tradukado.

La duan fojon UEA intervenis en la konkluda parto. Keller dankis la interpretistojn pro ilia grava laboro kaj tiam memorigis pri la esperantista propono al la Forumo. Ambaŭfoje Mousa Burayzat, reprezentanto de Jordanio kaj prezidanto de la Forumo, reagis pozitive.

Ankaŭ aliaj ĉeestantoj interesiĝis pri Esperanto kaj prenis informilojn pri ĝi ĉe la

enirejo de la salono. Keller kaj Common diris: «Ni rimarkis, ke nia duopa ĉeesto havis pozitivan efikon, ĉar oficistoj de UN kaj forumanoj aŭdis nin paroli Esperanton inter ni kaj tiel povis konvinkiĝi, ke ĝi estas vera lingvo.»

La Forumo estis bona okazo ligi novajn kontaktojn kaj plifortigi tiujn kun la prelegintoj de la Datrevena Simpozio de UEA, el kiuj ĉeestis, krom Anna Biondi, Renate Bloem, prezidantino de la NRO¹-komunumo, ambasadoro Ronald Barnes el Alasko. La reprezentantoj de la ŝtatoj kaj NRO-oj dum tri tagoj aŭdis pri Esperanto. La lastan tagon surtabla anglalingva ŝildo anoncis la apartenon de Keller kaj Common al UEA.

Poste UEA estis invitita prezenti al la Konsilio deklaron pri sia starpunkto en afero, kiun ĝi trovas tre grava. Tiu deklaro temas pri lingvaj rajtoj kaj estis submetita al la 9-a sesio de la Homrajta Konsilio en Ĝenevo, kiu okazis de la 8-a ĝis la 26-a de septembro en la angla, franca kaj hispana lingvoj.

Jen ĝia Esperanta versio :

Lingvaj rajtoj estas esencaj por ĉiu popolo, sendepende de la grandeco de ties membraro. Tiuj ĉi rajtoj devas esti protektataj precipe por malgrandaj grupoj. La Universala Esperanto-Asocio (UEA) subtenas la minoritatajn lingvojn de pli ol 100 jaroj.

La rajto de la infanoj lerni sian gepatran lingvon² kaj daŭrigi sian edukadon uzante sian gepatran lingvon ne nur estas grava por ilia kulturo, ĝi estas fundamenta por ilia psika evoluo. Pluraj larĝskalaj studoj en multaj diversaj landoj demonstris, ke, se indiĝenaj kaj minoritataj infanoj estas edukataj ĉefe uzante sian gepatran lingvon kiel lingvon de la instruado dum la unuaj 6 – 8 jaroj (kun samtempa, bona instruado de la reganta lingvo kiel dua lingvo fare de dulingvaj instruistoj), iliaj ĝeneralaj lern-atingoj estas pli bonaj. Se ili estas instruataj en la gepatra lingvo nur unu aŭ du jarojn kaj ili poste devas transiri al la uzo de la reganta lingvo, ili povas komence sukcesi relative bone, sed proksimume ekde la kvara lernojarilo ilia progreso ekmalrapidiĝas, kaj la diferenco inter ili kaj la infanoj parolantaj denaske la regantan lingvon plukreskas.

Ankaŭ gravas, ke la homoj kapablu komuniki je diversaj niveloj. UEA apogas la lernado de 2, 3 aŭ 4 lingvoj, laŭ la cirkonstancoj, t. e. 1^e

¹ Ne-registara Organizaĵo.

² Tio certe ne povas validi por enmigrintoj. En Belgio vivas enmigrintoj el pli ol 170 landoj!

la gepatran lingvon, 2^e la regionan lingvon, se ĝi estas malsama de la unua, 3^e la nacian lingvon, se malsama de la unuaj du, 4^e internacian lingvon kiu apartenas al neniu nacio – nome Esperanton.

Esperantistoj scias, ke, kiam multnacia grupo uzas unu neŭtralan, komunan lingvon, la kvalito de la komunikado estas ege specifa. La fina celo de Esperanto estas antaŭenigi pacon inter la popoloj igante la komunikadon pli facila kaj pli justa. La uzo de komuna lingvo evitigas situacion en kiu homoj uzantaj sian gepatran lingvon havas grandegan avantaĝon super la aliaj.

Ni dezirus, ke la Unuiĝintaj Nacioj pripensu tion ĉi koncerne siajn proprajn kunvenojn. La diferenco estas tre evidenta, kiam oni aŭdas delegitojn kiuj esprimas sin en la angla, franca aŭ hispana kaj por kiuj tiu ĉi estas ĉu la dua ĉu la tria lingvo. Kiam ekparolas iu uzanta sian gepatran lingvon, ofte la diferenco estas frapa – kion tiu ĉi diras, havas multe pli da pezo kaj allogas la atenton multe pli ol parolanto uzanta fremdan lingvon.

(El gazetara komunikado de UEA, n-ro 299)

Lingvofestivalo en Loveno

(Talenfestival in Leuven)

Post la granda sukceso de la pasintjara lingvofestivalo la lovena Esperanto-grupo 'Leuven 3000' decidis denove aranĝi lingvofestivalon – la duan – en sia bela urbo **la 7-an de februaro 2009** kun denove interesa ekspozicio (de kio ?) kaj kompreneble la ebleco gustumi diversajn fremdajn lingvojn, kiujn estos prezentatoj de denaskaj parolantoj.

Notu jam nun tiun daton en via agendo.

Por praktikaj informoj pri la festivalo vidu

<http://www.talenfestival.be> .

Gramatikaĵo: la participoj (2)

(Spraakunst: de deelwoorden - 2)

La participoj estas ankaŭ uzataj por formi la kunmetitajn tensojn, kiuj ebligas al ni tre fajne esprimi niajn pensojn. Sed multaj esperantistoj ne ŝatas ilin kaj ĉiakoste evitas ilin. Ili do ne akceptas la tutan lingvon de D-ro Zamenhof. Tamen ĉiu povas konstati, ke li tre bone pripensis ĉiujn facetojn de sia lingvo. Se li do kreis tiujn tensojn, li faris tion, ĉar li opiniis ilin necesaj aŭ utilaj. La tutenezado de la

kunmetitaj tensoj estus nepravigebla perdo por la Lingvo Internacia.

Oni efektive povas ofte anstataŭigi kunmetitan tenzon per simpla, sed ne ĉiam :
La patrino diras : «Petro, kial vi ĉiam nur venas hejmen, kiam ni estas manĝintaj ?»

Ni ne povas veni nun, ĉar ni estas manĝontaj. Johano estis soldato kaj iris al la fronto. Li ne plu estis revenonta.

Ankaŭ por esprimi antaŭtempecon kaj posttempecon, oni ne ĉiam rajtas uzi simplan tenzon anstataŭ kunmetita :

Kiam la patrino frapis sur la pordon de mia ĉambro, mi jam estis ellitiĝinta.

Kiam mi estos fininta mian laboron, mi venos.

Kunmetita tenso pli ĝuste aŭ pli fajne esprimas agon, ol simpla :

Tiam mi estis laboranta en la ĝardeno.

En tiu momento ni estos finintaj la laboron.

La kunmetita tenso precipe gravas en la preterito, kiu povas esprimi kvar diversajn aferojn, nome la komencon de ago, la daŭron de ago, la tutan agon aŭ antaŭtempecon (se la kunteksto estas klara), kio povus konfuzi la aŭskultanton aŭ leganton, ekz.:

Ŝi legis interesan libron.

Legante la frazon, oni demandas sin, ĉu ŝi komencis legi, daŭris la legadon aŭ legis la libron ĝis la fino. Tion mankon en la lingvo la esperantistoj solvas diversmaniere.

Komenco : *Ŝi eklegis interesan libron.*

Daŭro : *Ŝi estis leganta interesan libron.*

Fino : *Ŝi finlegis la libron.*

Antaŭtempeco: *Post kiam / apenaŭ la trajno haltis, ĉiuj vojaĝantoj eliĝis.*

Esperanto en la interreto

(Esperanto op het internet)

Kelkaj interesaj ligoj por esperantistoj: vidu (kaj ridu) :

<http://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto>

<http://esperanto.startpagina.nl/>

La esperanta interreto estas tre vigla.

Rigardu tiujn ĉi liniojn :

<http://www.esperanto.be/fel/>

http://www.ipernity.com/home/petro_desmet

<http://www.esperanto-nederland.nl/>

<http://eke.dse.nl/>

<http://www.pingveno.nl/>

<http://www.iei.nl/>

<http://www.uea.org/>

<http://www.kennislink.nl/web/show?id=178557>

<http://www.ipernity.com/home/roel>

<http://leren.nl/rubriek/talen/esperanto/>

<http://dakje.nl/>

<http://www.woordenboek.eu/vertaling/Esperanto/>
http://esperanto.net/info/index_eo.php
<http://lands.let.kun.nl/Tspublic/dreumel/esperanto.html>
<http://www.esperanto.se/kiosken/eo/eu>

Iomete pri libroj en la interreto

(Iets over boeken op het internet)

Mi ŝatas legi, kaj mi legas multe en Esperanto. Por vi, komencantoj, mi klopodas ĉiujfoje skribi kaj raportoj pri iu libro kiun mi legis. Mi esperas, ke vi ankaŭ volas legi tiujn librojn. Mi komencas per facilaj libroj, kaj mi klopodas priskribi librojn de malsamaj ĝenroj. La libro de ĉi tiu numero estas :

Tarzan de la Simioj de Edgar Rice Burroughs, elangligita de Donald J. Harlow

(<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Tarzan/>)

Multaj inter ni konas tiun filmon de Tarzan. Kvankam nuntempe estas elsendataj desegno-filmoj, ni ne plu konas la originalan rakonton. Estas vera plezuro legi la tutan rakonton.

Ĝi komencas per la historio de la gepatroj de Tarzan, antaŭ ol Tarzan naskiĝis. Oni lernas, kiel Tarzan restis tute sola en la ĝangalo kaj kiel li estis adoptita de la simioj.

Foje la libro estas tre timiga (la leĝo de la ĝangalo estas barbara), foje oni devas ridi pri la simpla menso de la gehomoj (ne nur de Tarzan).

Legante la libron, oni povus imagi, ke la vivo de Tarzan en la ĝangalo vere okazis. La libro estas skribita tre flue kaj certe ne tedos vin.

La uzata lingvo ne estas tre malfacila.

La traduko enhavas 28 ĉapitrojn. Mi vere volus, ke estus 28 libroj. (*An Olijslagers*)

Aktivajoj de LEA

(Activiteiten van LEV)

Merkredon, la 24-an de septembro 2008 :

Ben Indestege rakontis pri sia odiseado tra Eŭropo – ĉeestis ok personoj.

Ĉar Ben revenis nur meze de septembro de plurmonata vojaĝo tra norda Eŭropo kaj jam estis reforironta la 28-an al Britio, ni permesis lin, laŭ lia peto, prelegi pri sia lastjara vojaĝo tra Eŭropo la 24-an de septembro anstataŭ Jan Doumen, kiu prelegos la 29-an de oktobro.

Dum pluraj monatoj Ben vojaĝis de Belgio al la Nigra Maro kaj ree, ĉefe uzante sian dikfingron (petveturis), kaj restadis ĉe amikoj-esperantistoj, uzante sian libron de Pasporta Servo. Tiel en februaro 2007 li partoprenis en

Rumanio en skikonkurso, kiun li gajnis kune kun la rumanino Silvia Pura. (Vidu la revuo *Esperanto* n-ro 1202 de aprilo 2007, p. 93)

Merkredon, la 29-an de oktobro 2008

Jan Doumen prelegis pri la roterdama UK (19 – 26 julio) – ĉeestis ses personoj.

Kvankam Rik Leijscens kaj Jan aliĝis kaj pagis en aprilo 2008, ili ricevis nenian konfirmon de sia aliĝo, sed strange jes konfirmon de sia restado en la roterdama hotelo Philadelphia.

La UK okazis en la Borso WTC, kiu estas granda konstruaĵo kun multaj salonoj. Partoprenis en ĝi 1841 esperantistoj el 73 landoj, kiuj povis elekti inter pli ol 90 prelegoj, kunvenoj kaj koncertoj.

Jan kunportis la diĝitan fotilon de sia filino kaj multe fotis, sed pro misuzo de la aparato, li havas nenian foton.

La merkredon, tradician ekskursotagon, ili ŝipveturis dum 7 horoj inter la insuloj okcidente de Roterdamo kaj vizitis la mondfaman gigantan mardigon sub brilanta suno. Ĝis merkredo preskaŭ ĉiam pluvis, sed ekde tiu tago la vetero komplete ŝanĝiĝis kaj briladis varma suno.

Ĵaŭdon, la 27-an de novembro 2008

Vortludo 'Boggle', Pendumito gvidota de An Olijslagers.

Ĵaŭdon, la 18-an de decembro :

Zamenhoffesto en la kafejo 'Onder de Toren' apud la preĝejo de Peer je la 20h00.

Ni tutkore invitas ĉiujn membrojn de LEA partopreni en tiu festeneto honore al D-ro Zamenhof, la kreinto de nia lingvo. Detaloj pri la festmanĝo estos dissenditoj al ĉiuj per ret-aŭ paperpoŝto en novembro. Koran bonvenon !

Ni ridu ! (*Even lachen !*)

En la zooparko

- Rigardu do tiun grandan simion, onjo. Kiom ĝi similas al vi !

- Ĉu vi volas silenti, malgranda sentaŭgulo ?

Oni ne diras tiajn aferojn !

- Sed, onjo, ĉar la simio ne komprenas, kion mi diras, ĝi ne povas ofendiĝi !

Inteligenta virino

- Kredu min, ĉiuj virinoj estas malsaĝaj. En mia vivo mi renkontis nur unu inteligentan.

- Kaj kial vi ne edziĝis al ŝi ?

- Mi petis ŝin, sed ŝi rifuzis.